VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského klubu v Mnichově Hradišti, pro členy a příznivce mezinárodního jazyka.
Odpovědný redaktor: MUDr Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiště, Družstevní 1161 -
Cena: dobrovolný příspěvek.
Podávání novinových zásilek povoleno oblastní správou pošt Střední Čechy v Praze, č.j.P/Fiš-2295/92 ze dne 16.XI.1992

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx
Numero 3 Julio 1995 Červenec Číslo 3
xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxm

ESPERANTISTOJ estas homoj, kiuj laboras por la idealo en estonteco. Pro tio ni ne povas senesperi, ĉar ŝajne ni travivas cedon de nia movado. La junularo estas plene okupita per lernado de la samtempe plej forta lingvo angla kaj apenaŭ trovo forton lerni pluan lingvon, pri kiu multaj opinias, ke ĝi estas nur hobio. Tio povas aserti nur tiuj, kiuj neniam pli profunde studis problemon de la internacia lingvo. Tiuj konstatas, ke neniu alia lingvo havas tiajn supozojn por esti tiagrade facile lernebla, ke eĉ homoj kiuj estas nur meze lingve talentitaj, povos ĝin ellerni. Kaj tiuj konstatas alian miraklon: ili troviĝis en la socio de bonaj homoj, kiuj pro sia idealo kapablas multon oferi kaj kapablas multon oferi ankaŭ por siaj geamikoj. Estas vero, ke la mezaĝo de esperantistoj ŝovis sin al pli alta limo, kam ni lacaj de la vivo sentas valoron de amikeco. Ni ja multaj sentis sur propra haŭto, kion signifas simpla vorto amikeca kaj ĝuis ĝian efikon.

ESPERANTISTÉ jsou lidé, kteří pracují pro ideál budoucnosti. Proto nemůžeme zoufat, protože zdánlivě prožíváme ústup našeho hnutí. Mládež je plně zaměstnána učením současně nejsilnějšího jazyka angličtiny a sotva najdou čas učit se dalšímu jazyku, o němž se mnozí domnívají, že je jen koníčkem. To mohou tvrdit jen ti, kteří nikdy do hloubky nestudovali problematiku mezinárodního jazyka. Tací zjišťují, že žádný jiný jazyk nemá takové předpoklady být tak snadno studován, že i lidé, kteří jsou jen středně jazykově nadaní, mohou se ho naučit. A tito zjišťují další zázrak: ocitli se ve společnosti dobrých lidí, kteří pro svůj ideál jsou schopni mnoho obětovat a také pro své přátele dokáží mnoho obětovat. Je pravdou, že průměrný věk esperantistů posunul se do vyššího věku, kdy unaveni životem oceňujeme cenu přátelství. Z nás mnozí ucítili na své kůži, co znamená holé přátelské slovo a zažili jeho účinek.

Vera esperantisto ne povas esti homo, kiu la internacian lingvon uzas nur komerccele. Ĝi servas al plibonigo de interhomaj rilatoj kaj pro tio ĝi havas tian valoron. Multaj maljunaj esperantistoj forlasitaj de la mondo eĉ de familianoj tage atendas leterojn de amikoj, kiuj helpas konsoli ilian solecon. Por multaj estos granda festo la Universala Kongreso en Prago, kiam ili persone konatiĝos kun siaj ofte longjaraj esperantaj korespondamikoj. Seriozaj esperantistoj jam prepariĝas por nia monda festotago aŭ pli precize dirite festosemajno. Elserĉu esperantistoj el via regiono kaj ekzercu konversacion. UKo ĉiam estis granda instigo por esperantistoj de la gastiganta lando. Eĉ la nia – kiu la duan fojon okazos post 74 jaroj en Prago estos neniu escepto kaj ni kredas, ke ĝi alportos plifortigon de nia landa movado. Multaj opinias, ke nia asocia komitato post perdo de la sekretariejo en Jílská strato ne plu funkcias. Male. Jam nun la komitato fervore preparas organizajn aranĝojn. Librovendejo plene funkcias. ĈEA sendos al vi la libroproponon kaj vi povos elekti. Dum someraj tendaroj vi povos perfektigi en konversacio, se vi ne havas okazon viziti vian proksiman klubon. La pilzena somera tendaro montras la vojon: per malaltaj prezoj ĝi estas alpaŝebla por ĉiu interesulo. Iom da optimismo mankas al ni. Ek al la preparo por UKo, ek al nia persona pliperfektiĝo!

Pravým esperantistou nemůže být člověk, který mezinárodního jazyku užívá jen komerčně. To slouží k vylepšení mezilidských vztahů a proto má takovou hodnotu. Mnozí staří esperantisté opuštění světem ba i rodinnými příslušníky, denně očekávají dopisy od přátel, kteří pomáhají utěšit jejich samotu. Pro mnohé bude velkým svátkem Universální Kongres v Praze, kdy se osobně seznámí se svými často dlouholetými korespondentními přáteli. Seriozní esperantisté se již připravují na náš světový svátek či přesněji řečeno světový týden. Vyhledejte esperantisty z Vašeho okolí a cvičte se v konversaci. UKo vždy byl velkým podnětem pro esperantisty hostující země. Také ten náš, který podruhé bude uspořádán po 74 letech v Praze nebude žádnou výjimkou a věříme, že přinese posílení našemu zemskému hnutí. Mnozí se domnívají, že náš svazový výbor po ztrátě sekretariátu v Jílské ulici už nefunguje. Zcela opačně. Už teď svazový výbor horlivě zpracovává organizační záležitosti. Prodej knih plně funguje. ČES zašle Vám knižní nabídku a vy si budete moci vybírat. V letních táborech budete se moci zdokonalit v konversaci, nemáte-li možnost navštívit Váš blízký klub. Plzeňský letní tábor ukazuje cestu: za nízkou cenu je přístupný každému zájemci. Chybí nám trochu optimismu. Vzhůru k přípravě na Esperantský světový kongres, vzhůru k našemu jazykovému zdokonalení!

Dum la Kongreso en Prago 1996 estos aranĝita kurso de kuracado laŭ Yumeiho Terapio sen medikamentoj (Diina vertebra masaĝo) kun sekva 5-taga restado. Temas kaj pri kuraca kaj pri instrua kurso. Informoj en Centra kliniko, C.P.O.Tokyo, Box No 405, 100-91 Japanio, kie vi povas mendi libron kaj videobendon. Detala informo ankoraŭ sekvos.

Během Kongresu v Praze 1996 bude uspořádán kurs léčby podle Yumeiho terapio bez léků (Diino páteřní masáž) spolu s následujícím pětidenním pobytem. Jde o léčebný i školící kurs. Informace na Centra kliniko, C.P.O.Tokyo, Box No 405, 100-91 Japonsko, kde si budete moci objednat knihu. Bližší informace bude následovat.

Ing Alena Hromádková, estrino de Demokrata unio je demando pri ŝia opinio pri Esperanto dum la kunveno en klubo ALFA en Ostrava la 30an de majo respondis jene: „Nia rilato al Esperanto estas tre pozitiva. Mi mem ellernis Esperanton kaj gajni amikojn. Helpe de Eo estis facile en estinteco ligi kontaktojn, interkonatiĝi, gajni informojn, se alia ebleco ne ekzistis. Eo estas tre bona interkonsentiĝilo“.

Esperanta ŝako: La IVa Verda Olimpiko – okazos 7.7.-16.7.1995 en urbo Kalocsa kaj Szekazárd, Hungario. Ĉar la redaktoro de tiu ĉi bulteno ricevis informon nur post redaktfermo de la lasta numero 2/95, ni povas publikigi informon nur nun, lastmomente. Tamen se iu havus intereson partopreni en la olimpiko, demandu informon de la sekretario MUDr J. Canibal, 73401 Karviná, Okružní 867, tel. 06993 39680.

La klubo en Plzeň – vere viglas, kaj ne nur viglas, sed klopodas siajn aranĝojn fari alpaŝeblaj per atingeblaj prezoj. Ĉiumerkrede ili kunvenadas en Akademio Esprit, Koperníkova str. Nr 28 unua etaĝo 16-18h. (De la ĉefstacidomo per trolejbuso Nro 16 tris stacio.) - Ili preparis renkontiĝon okaze 700jara jubileo de la urbo Plzeň en la tagoj (sabato kaj dimanĉo), kun historia teatra prezentaĵo „Saracena diablo“ ludata sub ĉielo (50Kč rentistoj, infanoj, 100 Kč plenkreskuloj), tranokto sabata en hotelo (verŝajne 600-1200), en tranoktejo 100-300 Kč. - Somera Esperanto Tendaro de la klubo Plzeň-Č.Budějovice) – la plej malmultekosta somera tendaro en turisma tranoktejo en 6-litaj ĉambroj – kuirejo, manĝejo, bufedo loke – inter la tagoj de la 13-a kaj 26-a aŭgusto, prezo por unu semajno 770.- por du semajnoj 1375! Nedeviga esperanta programo, sen sistema kurso kaj atesto. Aliĝu ĉe Jiří Vomáčka, Koterovská 30, 30141 Plzeň.

Esperanto klubo en Česká Lípa preparas du feriajn ekskursojn: Promenon tra bela valo „Peklo“ la 22-an de julio, forveturo el Č.L. fervojstacio je la 8.38 h. - La 19-an de aŭgusto okazos vizito de la kastelo Zákupy kun komuna tagmanĝo en kastela restoracio, forveturo el la stacidomo ČL 10.08, fizike tre malpostulema (sen promeno). Informoj: Hana Vencovská, Okružní 2100, Česká Lípa 47001, tel 53299 6-14h.

Samtempe la plej freŝajn informojn el esperantista vivo en nia lando alportas Monata gazeto de E-handikapuloj INFORMILO – sendos ĝin al vi Asocio de Esperantistoj-handikapuloj, Josef Vaněček, Na okrouhlíku 21, 53003 Pardubice.

Interesuloj pri la ekskurso al Germanio (7.-10.VII. - Berlin+Postupim proksimuma prezo 4.200 Kč) aliĝu ĉe Stanislav Štefan, Vítězná 2955, 1.a turdomo, 27204 Kladno.
Zájemci o výlet do Německa (7.-10.VII. - Berlín, Postupim, přibližná cena 4.200 Kč) přihlašte se na adr: Stanislav Štefan, Vítězná 2955, první věžový dům, 27204 Kladno.

ESPERANTO-MAGAZINO de Tuluzo estas nova aktiveco de esperantistoj en Toulouse, Francio, nome dissendado de informoj pri E-o en lokaj urbaj radio-dissendiloj KANALSUD, OKCITANIC, Radio FMR, Radio d´OK, kiuj disaŭdigas informojn pri E-o dum 3 horoj semajne. Sendu afable informojn primovadajn al la redakcio, kiu volonte publikigos ilin. Kontaktu kun la tuluza grupo laŭ adreso Radio Kanalsud, Esperanto magazino, 40 rue Alfred Dumeril, Fr-31400 Toulouse.
Se ni ne povas penetri en ŝtatajn radio-dissendilojn, ĉu ĉe ni oni ne povus kontakti lokajn FM-dissendilojn? Kiu scias helpon?

INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO
A-1010 Wien. Hofburg.Michaelerkuppel
Lun., Ven.: 10h00-16h00, Mer: 10h00-18h00

Tel.: 0222/5355 145

aprilo 1995

Se vi ŝatas turismi aŭtune en mez-Eŭropo kaj krome esperantumi, venu al Vieno:

Kultura semajnfino:

Viena Aŭtuno

en la Internacia Esperanto-Muzeo, 21a kaj 22a de oktobro 1995

Programo:

1. Esperanto-kurso por tutkomencantoj (kun Kati Smideliusz, Szombathely),

2. Esperanto-kurso por progresintoj (kun Esperantina Mirska, Budapest. Atentu! Nombro de partoprenantoj limigita en tiu grupo. Nepre antaŭaliĝu!), *(Ĉiuj niaj lingvo-kursoj laŭ la rekta metodo, t.e. rekte en Esperanto. Ĉiu povas do partopreni sendepende de la gepatra lingvo, kiun oni havas.)*

3. Ed Borsboom (Nederlando): „Fenestro al la frua Esperanto-movado: La retrovita originala romano *Sen Titolo* de Ivan G. Ŝirjaev“. Herbert Mayer: „La frua Esperanto kaj Ŝirjaev“. *En la arkivoj de la Internacia Esperanto-Muzeo dormis dum jardekoj 218-paĝa manuskripto, kiu enhavas la eble unuan originalan romanon. La temo estas la Esperanto-Movado en iu nordrusa urbo: grupo da gejunuloj klopodas disvastigi la lingvon de Zamenhof. Estas priskribitaj iliaj aventuroj, iliaj sukcesoj kaj malsukcesoj ... sed ankaŭ unua amo kaj la amara rezigno pri ĝi…*

Sabate: 14h30 - 18h00, dimanĉe: 10h00 - 13h00.

Aliĝ-kotizo: 300,- S, Triona rabato por (meti-)lernantoj, studentoj ktp. Speciala kotizo por ĉeĥoj, hungaroj, poloj, slovakoj, slovenoj … (60,- S, rabato plia por studentoj eblas)

La kultura semajnfino en Bratislava okazos la 28-an kaj 29-an de oktobro 1995. Temo: Stratigiaj problemoj de la Esperanto-movado. Paralele: Esperanto-kurso por komencantoj. Adreso por pliaj informoj: Esperanto-Societ ´95, Račianska 80, SK-821 01 Bratislava, Slovakio.

ALIĜO

Mi aliĝas al la Viena Aŭtuno (21a kaj 22a de oktobro):
Nomo kaj adreso

Grupo (1, 2 aŭ 3):
(Vi povas ŝanĝi la grupon dum la aranĝo.)

* Mi metas la aliĝkotizon en la koverton
* Mi pagas mian aliĝkotizon al la poŝtkonto n-ro 7.597.468 de la Intern. Esp.-Muzeo, 1010 WIEN

Se oni venas sen antaŭa aliĝo, la kotizo altiĝas je 60,- S.

(Atentu: La Muzeo ne okupiĝas pri tranokteblecoj. Se vi volas, ni tamen povas sendi al vi adreso de relative malmultekosta hotelo: 300,- S. La Muzeo ne dissendas invitojn, kiuj garantias loĝigon ktp.)

Ĉu partopreni en Viena Aŭtuno 21+22.X.? Oni povus eluzi rabatan prezon (aliĝkotizo por ĉeĥoj 60S), tranokti en hotelo (300 S) aŭ en aŭtoĉaro. Sed necesas aliĝi minimume 40 partoprenontoj ĝis la 15a de aŭgusto, skribi pri detaloj al nia redaktejo, almeti poŝtmarkon por respondo kaj en pozitiva kazo antaŭpagi la minimuman prezon, manĝon kunpreni. La aranĝo promesas partoprenon de elstaraj esperantistoj el Ĉeĥio, Slovakio, Aŭstrio kaj Hungario. Kunlaboro de bratislavanoj kaj vienanoj estas promesplena kaj nova elemento en nia movado.

PAROLAS VIENO, el neŭtrala lando, en neŭtrala lingvo Esperanto – dimanĉe 4,30h (=6,30 nia somera tempo) kaj 11,30h 6155 kHz (49m). Se vi ne sukcesos kapti kontentige iun el la programeroj, petu de la redaktejo en Vieno alsendon de koncerna teksto. Adreso: Radio Aŭstria internacia, Esperanto-redakcio, AT-1136 Wien, Aŭstrio, Österreich.

Printempa semajno en Pensiono Espero Skokovy okazis 31.3-8.4.95 kun partopreno de proksimume 40 handikaptitaj esperantistoj. Regis amika etoso, neĝenata de ne tro favora vetero, diference de la estintjara renkontiĝo. La seminarioj en Skokovy estas signifplenaj pro firma eduka programo kun elstaraj lektoroj, kiuj zorgis por ke la renkontiĝo ne estu nur amuzam sed precipe ke ĝi alportu al ĉiu partopreninto profiton en scio de E-o. Mallongaj ekskursoj dum programaj paŭzoj estis agrabla refreŝiĝo por la „lernantoj“ kaj fonto de reakiro de novaj fortoj por gajni lingvosciojn. Neperfortaj amuzigaj instrumetodoj de la instruistoj faris la lernadon facila kaj agrabla. Kvankam la esperantista estontjara vivo estos sub influo de la aranĝota Universala kongreso en Prago, ni antaŭĝojas, ke realiĝos same sukcese nova seminario en Skokovy en printempaj monatoj.

Kluboj de esperantistoj en Liberec kaj Jablonec nN aranĝis dum la tagoj 19.-21.V.95 en turisma kabano Pláně sub Ještěd Iian internacian renkontiĝon de esperantistoj-naturamikoj. Partoprenis en ĝi 28 geamikoj krom du slovakaj amikoj kaj germanaj gastoj. Ĉio sukcesis, ekskursoj tra naturparko Ještěd estis interesaj, pitoreska rokaro, karsta groto (krasová jeskyně), belaj floroj, Světlá pod Ještědem kun literatura tradicio de Karolina Světlá kaj agrabla gastejo. Firmigo de amikecaj ligoj estis la plej pozitiva gajno por la partoprenintoj.

Esperanto-Klubo en Liberec kunvenas ĉiun duan merkredon en PKO 16h.
48a kongreso de Internacia Katolika Unio esperanta – okazos 8.-15.7. en Olomouc kun riĉa programo kaj ekskursoj. Senpere antaŭ kaj post la kongreso okazos internacia renkontiĝo de esperantistoj en Prago kaj Brno. Katolikaj kongresoj elstaras pro sia alpaŝeblo per moderaj prezoj favoraj precipe por la junularo (loĝado en studenta hejmo). La kongreso okazos sub protekto de kardinalo Miroslav Vlk. Aliĝo: Miroslav Šváček, Tršická 6, 75127 Pěnčice.

La dua jarcento de Esperanto – estas la nomo de la nova gazeto, komune eldonita de E-societo 95 en Bratislava, E-Muzeo Vieno kaj mikro-eldonejo „Pro Esperanto Vieno“. La revuo aperos kvarfoje en la jaro kaj raportos pri la propra agado de la kunfandiĝintaj eldonantaj organizoj, pri la E-movado precipe en Mez-eŭropo, kaj pri la tutmonda E-o kulturo. La abonkotizo por la jaro 95 estas 120 Kč. Eblas aboni ĉe Esperanta societo 95, Raĉianska 80, 83102 Bratislava.

La dua jarcento de Esperanto je jméno nového časopisu, společně vydávaného E-společností 95 v Bratislavě, E-muzeem ve Vídni a mikro-vydavatelstvím „Pro E-Vieno“. Revue se objeví 4x ročně a bude informovat o vlastní činnosti spojených vdávajících organizací, o E-hnutí především ve střední Evropě a o celosvětové E-kultuře. Předplatné na rok 1995 činí 120 Kč. Abonovat možno v Esperanto societo 95, Raĉianska 80, 83102 Bratislava.

Prago: La kunvenoj de la klubo okazas ĉiulunde (každé pondělí) inter 18-20 horo en Klub důchodců Nádražní 52, Praha 5. La kunveno komenciĝas ĉiun duan lundon per gramatiko sistema de Eva Seemanová.. Antaŭ la kluba

Brno: La kunvenoj okaza ĉiumerkrede en la ĉambro de urba oficejo, Staroměstská č.15, je la 19.30 h. Antaŭ la kluba programo okazas de la 17.00 ĝis 18.30 kurso por komencantoj kaj de la 18.30 ĝis 19.30 kurso por progresintoj.

HELLIANTO (Slunečnice) estas la informilo de Ukrainia E-Asocio. Petu senpagan provnumeron UA-263018 Ukrainio, Luck-18, p.k.26. Abonprezo 10 Internaciaj respondkuponoj jare.

HELLIANTO (Slunečnice) je informačním časopisem Ukrajinského E-svazu. Vyžádejte ukázkové číslo UA-263018 Ukrainio, Luck-18, p.k.26. Roční předplatné za 10 Mezinárodních odpovědek.

Nova ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio fariĝis oficiale Stanislava Chrdlová, Anglická 878, 25229 Dobřichovice. Ŝi akceptu nian koran gratulon!

Azia labortendaro en Vladivostok okazis de la 15a ĝis la 31a de marto 1995, subvenciita de japana firmao Mitsubishi. Partoprenis en ĝi krom aliaj 18 personoj el 6 landoj, ankaŭ 4-TEJOanoj (el Japanio, Rusio, Ĉinio kaj Suda Koreio). La partoprenon de TEJO en la tendaro iniciatis kaj ĝis lasta momento kunordigis s-ano Andrej Ananjin.

PROSPERO, Internacia Rondo Esperantista, P.O.Box 59008, Tel Aviv, 61590 Israelo, estas granda Internacia firmao, kiu interesiĝas pri disvastigo de sia vendreto tra la tuta mondo, precipe per Eo. Ĝi havas 700 mil distribuantoj, kiuj agas en 23 landoj uzante 15 laborlingvojn. Estiĝu ankaŭ ĝia helpanto!

Ĉu vi ŝatas ludi/lerni tenison? Vi povas travivi agrablan semajnfinon kun esperantistoj en Bratislava. Favoraj prezoj por loĝado kaj manĝo! Kontakto: Alice Komlošiová, Račianska 80, SK-83102 Bratislava.

Elekto de komitatanoj de UEA – okazos dum la Universala Kongreso en Tampereo. Delegitoj de UEA antaŭe elektos 8 komitatanoj el 10 proponitaj per forstreko de du personoj. Ĉijare konvenan preparon faris la gazeto EVENTOJ per interkonatiĝo kun la estintaj komitatanoj, kiuj post kvinjara agadperiodo konatiĝis publikon pri efikoj de sia laboro, pri sia persono kaj pri siaj planoj por la estonta elektoperiodo, se ili kandidatiĝos. Ilia raporto estas interesa, bedaŭrinde tro malfrue aperiĝinta, tiom, ke ne eblas publikigi ĝin ankaŭ en nia bulteneto pro troa vasteco.

Karlovaraj esperantistoj kunvenadas ĉiun unuan kaj trian semajnon ĉiam merkrede de la 18-a ĝia la 20-a horo en la kuracista libroĉambro en la mondkonata sanatorio IMPERIAL en Karlovy Vary. La kunvenoj estas eblaj senpage la konsento de la direktoro de la sanatorio MUDR Stanislav Široký, kiu estas ankaŭ ano den nia E-movado. Aktualaj informoj ĉe Alena Klementová, kpt. Nálepky 7, 36004 Karlovy Vary.

Karlovarští esperantisté schází se každou první a třetí středu od 18 do 20 hodin v lékařské knihovně světoznámého sanatoria IMPERIAL v Karlových Varech. Schůze jsou možné bezplatně se souhlasem ředitele sanatoria MUDr Stanislav Širokého, který je také členem esperantského hnutí. Aktuální informace u Aleny Klementové, kpt Nálepky 7, 36004 Karlovy Vary.

Pensiono ESPERO Skokovy aranĝos intiman amikan renkontiĝon aŭtunan por esperantistoj dum kelktaga restado kaj mallonga kuracado, konvena por senioroj. Se estos sufiĉe da aliĝantoj ni povos servi kuracbanado, dieta terapio, masaĝoj, elektroterapio REBOX (novinventita, plene pagita de sanitarasekurejoj), senpaga kuracista pritrakto kaj konsilado, injekta geriatria kuracado. Eksterodinare malmultekosta prezo: 180 Kč tage por loĝado en bone hejtitaj modernaj ĉambroj kaj por tuttaga manĝado (3x tage). Termino versimile en novembro post interkonsento kun interesuloj. Petu detalan informon.

Uzo de PREPOZICIO (daŭrigado): EN – 1. Prepozicio montranta:
1. La lokon, interne de kiu estas io aŭ iu: Mi loĝas en Berlino; sana kiel fiŝo en akvo; en la lingvo Esperanto mi vidas lingvon de estonteco; en tiu propono kuŝas la solvo. -
2. La lokon, internen de kiu almoviĝas iu aŭ io: iri en teatron; skribi en libron; sablero falis en mian okulon; fali en kaptilon. -
3. La tempodaŭron: tio okazis en lundo; mi parolos kun vi en tempo pli oportuna; varma manĝo unufoje estas la tago. -
4. Tempolongon: legi libron en kvar tagoj; la dometo la homo reviviĝis; vi forgesos nin en ses monatoj. -
5. La forto grandiĝas en prematéco; en granda kolero; en konsento; en akompano kun iu. -
6. Unu el la cirkonstancoj, inter kiuj fariĝas la ago: li kuris malsupren en kelkaj saltoj. -
7. La rezultoj de aliiĝo: fendi ŝtipon en du partojn; traduki en alian lingvon. -
Memstara uzo: Ena (interna) – Ene (interne): mi sendas al vi ĉi-interne la poemeton. - Enigi: ŝi enigis siajn manojn en siajn longajn harojn. - Eniĝi: Kiam fratoj batalas, fremdulo ne eniĝu. -
EN uzata prefikse: la libro enhavas 30 paĝojn; la ĉambro entenis 40 personojn. Engluti, enskribi, enblovi, enbrakigi, envicigi, enkasigi, enterigi, enloĝigi, enŝipiĝi, endormiĝi ktp.
FAR: evoluiĝis en „fare de“, kiu estas pli preciza ol simpla DE. Ĝi montras la aganton: libro far´ Petro= libro fare de Petro (Petro estas aŭtoro). Ĝi evitas miskomprenon: trenado de ĉevalo (= kaj: la ĉevalo trenas; - kaj ĉevalo estas trenata – pro tio ĉaro trenata far ĉevalo.)

Kiel diri? Esperanta frazeologio de Lentaigne. Daŭrigata.

KORPO: Splinto (Dlaha). Propran ĝibon neniu vidas. Sidi sur kalkanoj. Kalkano de Aĥilo. -
KORO: Koro sensenta, „dura“; nobla, milda, suferanta. Koron fendi, malŝarĝi, frakasi; Havi koron el ŝtono. Gravuri ion en la koron. Io lasas profundan sulkon en lia koro. Gardi iun en la koro. Vivi en ies koro. Faru kion (kiel) diktas via koro. Malkovri sian koron antaŭ iu. Paroli al koro de iu. Senkore konduti. Elaŭdi la voĉon de sia koro. Senkora konduto. Vi parolas kiel senkorulo. Atrio kaj ventrikloj. Sistolo kaj diastolo. Valvoj. Palpitacio. - SANGO: Sanga makulo, batalo. Delavi ion per sango. Oferi sian sangon. Fari ion kun malvarma sango. Glaciiĝis la sango en liaj vejnoj. Endas tuj fari sangan transverŝon. Transfuzi. Banko de la sango. Infarkto. Embolio. Trombozo. Flebito. Leŭkocitoj. Hematioj (ruĝaj eroj).

UK 14.9.1992 *KORESPONDI DEZIRAS*

Studentino de altlernejo 17-j, deziras korespondi amike: Maria Luisa Cugnod, Corso Eŭropa 10, I-12084 Mondovi (CN), Italio.
Flegistino pensiumita, 55j, dez kor. kun esperantistoj pri diversaj temoj (vivo, homo, naturo) Józéfa Winicka, ul.Janickiego, 21/21, PL-71270 Szczecin Pollando.
Junaj esp-istoj el Klaispeda, kun t.mondo pri ĉiu temo. Esperanto-klubo ab/k 179, LT-5800 Klaipeda, Litovio.
Kun leteramikoj por krei personajn kontaktojn: Lijana Valkieĉiute, str. Dainu 43-48, LT-5406 Ŝiaŭliai, Litovio.
Ksenia Gubanova, instruisto, Kreves pr.41-47, LT 3044 Kaunas.
Du 19jaraĝaj ĝemelaj fratinoj, studentinoj de ĥemio, dez kor. kun junaj 16-26 jaraĝaj. Ili kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn, precipe pri naturo, ŝatas hundojn. Eva i Dorota Brylska, ul. Kilinskiego 11b2, PL74-200 Pryzyce, woj. Szczecin.
Rodrigo Oliveira Melo, 23j, Av.Mal.Castelo Branco, 519, Paraiba do Sul-RJ 25850-000 Brazilio.
Maria Angélica Almeida Queiroz, 23j instruistino, Rua Rufino D´Jorge 16, Paraiba do Sul-RJ 25850 Brazilio.
Marcin Zlotkovski, 15j, pri ĉt, precipe ŝako, matematiko kaj angla lingvo, kolektas malnovajn monerojn. Ul.Fabriszina 22/33, PL 07-130 Lochow.
Sinjorino Célia Eni Honorato Nues, R.Hortencia, 226, Inema, Paraiba do Sul-RJ 25850, Brazilio.
Taťjana Ermakova, 18j, universita studentino, filologo, volus trovi amikojn en diversaj landoj. 23 gvardejskoj divizii, 14-62, RUS-163060 Arĥangelsk, Rusio.
Yokoyama Hiroyuki, 35j laboristo en ekologia observejo, dez. kor pri komputiloj MSX kaj ĝiaj hardvaroj. Sirakaba-Tyo 3-1-5 306, Tomako-mai, J-053, Japanio.
Jed Melzter, studento, dez kor. pri muziko, scienco, ekologio kaj fremdaj kulturoj. US 1440 Circle Drivo, Telford, PA 18696.

****
*****
***
*

Esperantský klub
CZ 29501 Mnichovo Hradiště

Podávaní novinových zásilek povoleno oblastní správou pošt Střední Čechy v Praze, čj. P/Piš-2295/92 ze dne 16.XI.1992